

Ĉu gravas, se lingvoj mortas?



**Futbalo:
adiaŭas
fenomeno**

**Irlando: la batalantoj
trovas sian destinon**


**Germanio:
fino de ministreco**

Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj

Lidia Zamenhof

La kompleta verkaro de Lidia Zamenhof, kompilita de Jean Amoureux, Zofia Banet-Fornalowa, Masayosi Higasida kaj Bernhard Westerhoff, kun antaŭparolo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.

La vivon de Lidia Zamenhof, plej juna el la tri Zamenhof-infanoj, stampis la du mond-militoj. La unuan ŝi travivis adoleske kaj dum la dua ŝi pereis koncentre. Ŝiaj en tiu ĉi volumo kolektitaj artikoloj, paroladoj kaj fikciaj verkoj pentras unikan bildon de la periodo intermilita. Ili sumigas al granda, arda prediko por la esperantistojn savi kaj mobilizi. Ŝi volis ilin savi de la regantaj naziismo, rasismo kaj aliaj materiismaj ideologioj. Kaj ŝi sopiris vidi ilin fermenti la venon de paca kaj justa estonteco pri kiu revis ŝia patro kaj kiun profetis ŝia religio.



Eldonjaro: 2009

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 430 paĝoj,
ISBN: 978-90-77066-38-6;
prezo ĉe FEL: 24 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 14,40 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Ne menciui la n-vorton



7

Estas monatoj kaj monatoj ... kaj Monato. Estas monatoj, dum kiuj okazas – almenaŭ mondscale – nenio notinda; estas monatoj, en kiuj – laŭvorte – skuigas la mondo. Monato tia estas marto 2011: ter-tremoj en Japanio, aer-tremoj – pro bombado – en Libio.

Kiamaniere Monato priraportu la du eventojn? Honeste: estas mal-facilege.

Fino de ministreco: kroniko



12

La plej populara kaj ŝatata politikisto de Germanio estas Karl-Theodor Freiherr (barono) von und zu Guttenberg, mallonge zu Guttenberg [cu gutnberk].

Tion pruvas enketoj, laŭ kiuj en februaro 2011 ĉ. 68 % de la elektantaro kontentis pri lia agado kiel ministro pri defendado. En januaro estis eĉ 76 %. Zu Guttenberg estas membro de la regiona partio CSU, kiu kun sia frata partio CDU kaj kun FDP konsistigas la federacian registaron de Germanio.

Ĉu gravas, se lingvoj mortas?

25

Nuntempe internaciaj organizaĵoj kiel Unesko kaj pluraj individuaj influhavaj voĉoj atentigas pri la neriparebla perdo, kiun la homaro suferas, kiam eĉ unu lingvo estas forgesita. Interesa konstato estas, ke multaj tiaj voĉoj devenas ĝuste de la amerika kontinento, kie tiom da aŭtoktonaj kulturoj, lingvoj kaj popoloj estis intence aŭ senintence eliminataj post la alveno de eŭropanoj.



Japania marbordo post tertremo de la 11a de marto 2011.

politiko

BALKANIO	9
Kastelo „sieĝata“	
IRLANDO	10
La batalantoj trovas sian destinton	
PLAGIATO	12
Fino de ministreco: kroniko	
EMERITIĜO	14
Labori pli, enspezi malpli.	
BELGIO	14
Divers(ec)aj rakontoj	

moderna vivo

ĈINIO	15
Stirante ĉirkaŭ ŝtopiĝoj	
FLAGOJ	15
Stela „his“torio	
DEMOGRAFIO	16
Plaro, aŭ la Flava Terpomo	
HISTORIO	18
Fragmentoj de la dua mondmilito	
FUTBALO	21
Adiaŭas fenomeno	
NUTRADO	21
Superbazare modifitaj	

scienco

MALSANOJ	22
Poliomjelito: ĉu la dua tutmonde likvidota infektmalsano?	

turismo

FRANCIO	24
La ideala palaco de poŝtisto Cheval	

lingvo

LINGVO-MALAPERO	25
Ĉu gravas, se lingvoj mortas?	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7-8
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakte al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Bosnio-Herc.	BAM	50	55	30	11	18
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Grekio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalia	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, 4/23 Albuera Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: libro servo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: aon.913548977@aon.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Bosnia kaj hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698. Reto: info@esperanto.ba.
- > **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
- > **Francia:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
 - > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 - > **Hungara:** AbonaSoft Bt, HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
 - > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
 - > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 - > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: fesp.it@infinito.it.
 - > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
 - > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
 - > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Reto: esperanto@saluton.net.
 - > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 606-1250,

- Escáz. Reto: miaumiau@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City 0630. Reto: gddewar@ihug.co.nz
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljković 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.rs.
 - > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11, SK-3601 Martin. Reto: marcek@esperanto.sk.
 - > **Slovenaj:**
 - > Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
 - > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
 - > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schledorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Indaj informoj



Matene mi veturas al la oficejo per tramo. Se ne estas multaj ŝtopiĝoj, 20 minutoj sufiĉas por fari la jam perfekte konatan itinieron. Tiun tempon mi uzas plej ofte

trarigardante la ĵurnalon. Mi rigardas la ĉefajn titolojn de *De Standaard* – tiel nomiĝas mia taggazeto – kaj kelkajn artikolojn mi legas komplete.

En la lastaj tagoj ĉiuj ĉeftitoloj temis pri la katastrofoj en Japanio: pri Fukuŝimo kaj Tokio, pri ter- kaj mar-tremoj, pri vivo kaj morto. Sed ĉi-matene, kio okazas?, plu nenio pri Japanio. La gazeto titolis „Mortis la blanka urso Knut“, „Usona defendanto de samseksemuloj ne plu rajtas iri en virajn necesejojn“, „Belec-sugestoj de *Lady Gaga*“. Nenio plu pri Japanio inter la titoloj. Ĉu la situacio tie subite mirakle solviĝis? Ĉu ne plu estas problemoj? Nu, sendube ili ja ekzistas, kaj kvankam *De Standaard* certe ne povas esti konsiderata bulvarda aŭ sensacia gazeto, ĝia redaktistaro ŝajne tamen opinias, ke mankas „veraj novaĵoj“ kaj ke urseto Knut pli gravas ol miloj da homoj, kiuj vice staradas antaŭ malplenaj japanaj superbazaroj. Ne miskomprenu min,

mi tre ŝatis la ĉarman urseton kaj tre bedaŭras pri ĝia morto, sed per kiuj kaj kiaj iloj la gazetaraj redaktistoj mezuras la „valoron“ de niaj mondaj novaĵoj?

Tiujn samajn demandojn redaktistoj de MONATO ankaŭ havas. Kio estas valora informo por vi, kara leganto? Valora sendube ne estas tio, kion vi jam legis en via loka gazeto, vidis trifoje en via landa televidstacio, ĝi ne estas tio, kio estas antaŭmaĉita de la mondaj novaĵagentejoj ... Indaj informoj por MONATO estas neatenditaj vidpunktoj, raportoj verkitaj de lokaj homoj, materialo verkita por internacia postulema publiko. La redaktistoj de MONATO esperas, ke ili povis denove liveri tion ĉi al vi en tiu ĉi maja numero! Agrablan legadon!

Sincere via

Paŭl Peeraerts



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: info@fel.esperanto.be, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro g; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

sociaj retejoj:

- Twitter: @FEL_Antverpeno
- Facebook: <http://eo-eo.facebook.com/revuo.Monato>
- Ipernity: <http://flandra-esperantoligo.ipernity.com>

ĉefredaktoro:

Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Rob Moerbeek, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

teknika redaktoro:

Christina Schwarzenstein

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-

spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgrasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellan-gasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

- **Leteroj:** MONATO, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

- **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro propraliniacie. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

- **Lingvo:** Andy Peetermans, Schaliehoevestraat 23, B-2220 Heist-op-den-Berg. Rete: lingvo@monato.net.

- **Medio:** Slezák Tamás,

Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: medio@monato.net.

- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

- **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: noveloj@monato.net.

- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.

- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.

- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellan-gasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

La mankanta j ...

Mi tute konsentas kun la vidpunkto de Paul Gubbins (MONATO 2011/4, p. 7): ni permesu al ni peketojn en la presarto – kaj eĉ en la stilo kaj gramatiko – por povi ĝui la senkompare pli grandan lukson de senĝeno, en kiu floras seriozaj enhavo kaj stilo.

Probal DASGUPTA
Barato

Cenzuro

Mia vidpunkto rilate la enkondukon *Cenzuro* (MONATO 2011/3, p. 5) estas, ke la revuo MONATO devas ĉiam malfermi siajn kolumnojn al ĉiuj artikoloj sen ia formo de cenzuro.

Jules GROUYNE
Belgio

Cenzuro (2)

Volonte mi reagas al la malferma artikolo de Paul Peeraerts en la mar-ta eldono. MONATO nepre restu kia ĝi ĝis nun estas! Sciu, ke jam en la antikveco estis homoj, kiuj mortigis la mesaĝanton. Ĉu vi scias, kiam mi

malabonos MONATON? Tuj kiam vi ekcenzuros! Do kuraĝon, saĝecon kaj sukceson!

Kees RUIJG
Nederlando

Cenzuro (3)

Kiam mi foliumas novan MONATON, mi elektas, kion mi legos, pro la temo de la artikolo, ne pro la opinio de la verkinto. Mi eĉ legis la absurdan artikolon pri la naskiĝloko de Obama, ne pensante pri malabonado! Nur strangulo lernas Esperanton por legi nur opiniojn, kiuj kongruas kun liaj.

Mi esperas, ke MONATO restos malferma kaj plu kontraŭos ĉiaspecan cenzuradon.

Peter BOWING
Hungario

deziras al la nova ĉefredaktoro Paul Gubbins. MONATO estas bonŝanca havi denove eminentan ĉefredaktoron. Li estas la ĝusta homo en la ĝusta loko.

Mi transdonas salutojn kaj bondezirojn ankaŭ al la tuta redakta skipo de MONATO. Sukcesojn por via respondec, valora kaj bezona laboro.

Zofia BANET-FORNALOWA
Pollando

Mistajpita ministrino

En mia artikolo *Tigro, kiu ne pluras* (MONATO 2011/3, p. 10) mi mistajpis la nomon de la antaŭa irlanda ministrino. Mi nomis ŝin Mary Harvey, sed ŝia vera nomo estas Mary Harney [mejri harne].

Garvan MAKAI
Irlando

Gratulon kaj dankon (3)

Estu afabla transdoni miajn salutojn kaj vortojn de rekono al Stefan Maul. Li efektivigis valoregan laboron dum 30 jaroj. Dankon, kara amiko Stefan! Samtempe mi salutas kaj bon-



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.



La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado.

Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la retaj versioj de MONATO.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Ne menciu la n-vorton

Paul GUBBINS

Estas monatoj kaj monatoj ... kaj MONATO. Estas monatoj, dum kiuj okazas – almenaŭ mondscale – nenio notinda; estas monatoj, en kiuj – laŭvorte – skuiĝas la mondo. Monato tia estas marto 2011: ter-tremoj en Japanio, aer-tremoj – pro bombado – en Libio.

Kiamaniere MONATO priraportu la du eventojn? Honeste: estas malfacilege. Eventoj en ambaŭ landoj evoluas, ŝanĝiĝas de horo al horo. Ne multe helpas al ni la ĉiutagaj raportoj de esperantistoj en Japanio (bedaŭrinde

mankas korespondantoj en Libio: se tiea esperantisto legas ĉi tiujn vortojn, tiu nepre sin anoncu). Tiaj raportoj preskaŭ tuj malaktualiĝas: taŭgaj, eble, por retejo, sed por ĉiumonata periodaĵo, apenaŭ.

Cetere MONATO – aŭ iu ajn Esperanto-periodaĵo, eĉ retejo – malkapablas konkurenci kun ŝtate aŭ private organizataj amaskomunikiloj, ĉu paperaj, radiaj, televidaj, ĉu retaj. Tiuj, se juĝi laŭ britaj informfontoj, detale kaj sincere priraportis la eventojn en Japanio kaj Libio. Do tiu, kiu volas informiĝi pri la tieaj okazantaĵoj, nepre kaj kompre-

neble turnas sin al profesiaj, nacilingvaj informiloj.

Distanco

Tamen ĉiumonata periodaĵo posedas alispecajn fortojn. Ĝuste ĝia distanco, ĉu fizika, ĉu tempa, for de eventoj rapide evoluantaj, ebligas al ĝi superrigardi kaj, laŭeble, prikomenti. Jen ĝia rolo ... kaj ni prie fieru.

Perspektivo tia, ekzemple, ebligas demandi, kial la nuklea industrio – kiu kretene konstruigis centralojn en regiono konata pro tertremoj,



La 11a de marto 2011 - nuklea centralo Fukuŝimo post tertremo. Ĉu tamen espero en funde senesperiga monato?

kaj kiu dum la katastrofo konstante kaj mensoge subtaksis la danĝeron – daŭre provas sin defendi. Arogante, en radio-intervjuo, nukleo-inĝeniero diris, ke, kiel nunaj aŭtoj pli sekuras ol veturiloj de la 60aj kaj 70aj jaroj, tiel nunaj centraloj pli sekuras ol tiuj – kiel ĉe Fukuŝimo – instalitaj antaŭ jardekoj.

La inĝeniero, tre oportune, forgesis, ke ni ne plu ŝoforas per aŭtoj 30-, 40-jaraĝaj. Aliflanke ni ankoraŭ „ŝoforas“, almenaŭ parte, centralojn el la fruaj jaroj de la nuklea industrio. Do ne eviteblas danĝero; ne pretervideblas risko.

Ŝafoj

En la 80aj jaroj mi leteris al la tiama brita ĉefministro, sinjorino Thatcher, kiu insistis, ke nukleaj centraloj estas tute sekuraj. Se tiel, mi demandis, kial vi ne konstruigas centralojn meze de Londono, apud la parlamentejo, anstataŭ en foraj apudmaraj regionoj, kie vivas pli da ŝafoj ol da homoj? Respondon mi ankoraŭ atendas.

Cetere, ĉu ne ridinde, ke la germana kanceliero, Angela Merkel, decidis post la katastrofo ĉe Fukuŝimo malfunkciigi malnovajn centralojn en Germanio? En Germanio ne ekzistas tertremo-risko, kaj la centraloj restas precize tiom (mal)sekuraj kiel antaŭe.

Ĉu eblas lerni rezulte de la katastrofo? Teorie, jes. Tamen la lecionoj estas jam konataj kaj ankoraŭ ne aplikitaj: apenaŭ fidindas apologiistoj de energio-industrioj kiel la nuklea, la nafta; nepras limigi la energi-konsumon; gravas evoluigi ekologie plaĉajn energi-fontojn ktp.

Fakuloj

Praktike, tamen, tre dubindas, ĉu ni aplikos la lecionojn eĉ post la Fukuŝimo-katastrofo. La problemoj estas, ke temas – malgraŭ ĉio – ĝuste pri katastrofo, ne katastrofego. La t.n. fakuloj, kiuj kuris tien kaj reen, serĉante solvojn, taksis la katastrofon unue je kategorio kvar, poste kvin (el ok kategorioj). Verŝajne necesus la plej grava kategorio – ok – por sufiĉe ŝoki kaj ebligi fundan reorientigon de nuklea politiko. Kondiĉe, tamen, ke post tia katastrofego, restos homoj sur la tero por realigi reformojn.

Ĉu pesimisma? Jes. Same rilate la UN-intervenon en Libio. Lastatempe Irako, tiam Afganio, nun Libio. Samaj pretekstoj, kredeble samaj rezultoj. Ni protektas la ordinaran, subpremitan homon. Ni batalas por demokratio. Ni luktas kontraŭ diktatoro (kiu ĝis antaŭ kelkaj semajnoj estis, se ne fidata, almenaŭ tolerata).

Se tiel, kial Obama, Sarkozy, Cameron kaj la aliaj apaĉoj ne intervenas ekzemple en Ebur-Bordo? Jam mortis centoj da civitanoj en Abiĝano, dum la venkita prezidanto – Laurent Gbagbo – rifuzas rezigni pri sia povo. Subprematoj? Maldemokratio? Diktatoro? Jen ingrediencoj troveblaj en la Libio-kaĉo aŭde kirlataj de okcidentaj politikistoj kaj iliaj amikoj en la armil-industrio. Sed neniu intervenas en Ebur-Bordo kaj en la dekoj da aliaj, simile disŝiritaj, landoj en la mondo.

Kalumnio

Memevidente. Kulpas la n-vorto, kiun la politikistoj ne kuraĝas mencii. En Libio, kaj en aliaj arabaj landoj,

gravas nafto: en Ebur-Bordo, malgraŭ lastatempaj submaraj trovoj, la nafto-merkato malpli valoras. Sed ĉu, laŭ la politikistoj, ili intervenas en Libio pro nafto? Ho, kalumnio, se tion vi asertas.

Jam de jaroj politikistoj scias, ke pli facilas „solvi“ (t.e. krei) internaciajn problemojn ol naciajn. Pli impresas, kaj pli plaĉas, aviadi de konferenco al konferenco ol enkotiĝi en ekonomiaj krizoj, senlaboreco, inflacio, fervojoj, sanservoj, k.s. La nepoj (kaj la historiistoj) vin benos, ĉu ne, se vi elspezas la monon de impostpagantoj por raketoj kaj misiloj prefere ol vivteni popolan hospitalon aŭ bibliotekon.

Armiloj

Feliĉe, kaj aparte dum recesio, okcidentanoj – ĝenerale pli kleraj ol siaj politikaj mastroj – komencas ne plu kredi la mensogojn. Kontraste al Irako, kontraste al Afganio, pli kaj pli aŭdiĝas la voĉoj: Kion ni faras en Libio? Jen araba afero. Solvu ĝin la Araba Ligo, konsistanta el kelkaj naŭze riĉaj (kaj mem foje nur parte demokratiaj) landoj, kaj solvu ĝin per la armiloj, kiujn ni al ĝi vendis.

Libio ne estas afero de okcidento aŭ, se jes, ankaŭ Ebur-Bordo kaj deko da simile suferantaj landoj. Dum hejme solvendas amaso da problemoj financaj, sociaj, politikaj, dediĉi homojn kaj rimedojn denove al fora, fremda milito estas kruda frenezajo. La fakto, ke eŭropanoj kaj aliaj tion pli kaj pli konscias, iomete esperigas en funde senesperiga monato.



La Deklingva manlibro pri politiko de Stefan Maul
helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono.

Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio,
butiko@fel.esperanto.be aŭ
www.retbutiko.net

kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.

Kastelo „sieĝata”

Konfrontiĝis pervorte kaj perforte etnoalbanoj kaj slavomakedonoj en Skopje (albane Shkup) pro la konstruado de ortodoksa preĝejo ene de la kastelo de la urbo.

Albanoj – plejparte en la regiono islamreligiaj – opinias, ke la kastelo estas komuna historia trezoraĵo, al kiu oni aldonu simbolojn nek religiajn nek naciajn. Slavomakedonoj opinias, ke temas pri rekonstruo de antikva preĝejo el la tempo de Justiniano. La registaro de Nikola Gruevski kreis monfonduson de 1,2 milionoj da eŭroj por kompletigi la restaŭradon en la kastelo, inkluzive de la preĝejo.

Dividitaj

Sendependaj analizistoj opinias, ke la konfrontiĝojn intertnajn instigis politikistoj. La albanoj mem tie estas dividitaj en du kontraŭstarantaj partioj: la koalicia BDI (Unuiĝo Demokratia por Integriĝo) kaj la opozicia PDSH (Albana Demokratia Partio).

Ties estro, Mendu Thaĉi [taĉi], forte kritikas BDI, ĉar tiu ne protektas la historiajn rajtojn de la etnoalbanoj, el kiuj 200 000 loĝas en Skopje. Dume la alia slavmakedona opozicia partio socialdemokrata (LSDM) kritikas Gruevski, ĉar ĉiam dum lia regado – ekzemple en 2001 – okazas intertnaj konfrontiĝoj.

Bardhyl SELIMI



BARDHYL SELIMI



BARDHYL SELIMI

En la kastelo, kie oni nun konstruas ortodoksan preĝejon, estis trovitaj antaŭ kelkaj jaroj la restaĵoj de trimiljaraĝa domo, kiu atestas pri la antikveco de la loĝloko.



BARDHYL SELIMI



BARDHYL SELIMI

Etnoalbanoj kaj slavomakedonoj interbatalas en Skopje pro la konstruado de preĝejo en la antikva urba kastelo.

MONATO en Facebook

Kiu anas en la socia retservo *Facebook* ekde nun povas senpage ricevi mallongajn informojn pri MONATO. Sufiĉas iri al la adreso eo-eo.facebook.com/revuo.Monato kaj alklaki supre la ligilon *Ŝati*. La mesaĝoj de MONATO ekde tiam aperos en via novaĵlisto.

pp



**Artikolojn pri la politiko
en via regiono sendu al
politiko@monato.net.**

La batalantoj trovas sian destinon

La 23an de februaro la irlanda popolo voĉdonis en nacia elektado. La rezulto transformis la politikan medion. Ĝi donis iom da espero, ke povos esti mildigita la katastrofa situacio, en kiu la lando troviĝas post la morto de la tiel nomata „Kelta Tigro” – dumtempa prosperega ekonomio – kaj la kolapso de la irlanda banka sistemo.

La plimulto de la voĉdonantoj firme eljetis el la 166-seĝa parlamento la regantan koalicion, kiu konsistis el granda plimulto de la respublika partio Fianna Fáil (FF) kaj eta minoritato de verduloj. El la iam tre promesplena Verda Partio (VP), neniuj kandidato estas elektita aŭ reelektita. Jen eble malracia reago de la publiko. La verduloj eniris la koalicion post la „tigra” periodo, esperante bremsi la ekscesojn de FF.

La verduloj estis la plej aktivaj gvidantoj de iniciatoj por krei medio-amiikan teknologion, verdajn industriojn kaj sanan ekologion. Pro tio la malapero de VP estas grava repuŝo por Irlando. Sen tiaj iniciatoj, oni timas, ke la lando iĝos ekologie eĉ pli postrestanta ol ĝi nun estas.

Venĝo

Do furioza publiko venĝis sin kontraŭ registaro, kiu senlime malŝparis la financojn de la ŝtato, garantiante per miliardoj da eŭroj ĉiujn irlandajn bankojn, inkluzive de la plej „toksa” (la Anglo-Irlanda Banko), favorante riĉulojn, reduktante la servojn al blinduloj, senlaboruloj, simplaj laboristoj kaj mensaj handicapuloj, kaj malpligrandigante la minimuman salajron, sed samtempe pagante altegajn salajrojn kaj pensiojn al siaj ministroj.

La rezultoj de la elektado montras,

ke FF perdis 70 % de sia iama apogo kaj du milionojn da unuapreferaj voĉoj, laŭ la irlanda sistemo de proporcia reprezentado per unuopa transigebla voĉo.

Korupta kaj nepotisma

Eble nur irlandanoj povas plene kompreni la profundan signifon de la malvenko de FF. La partio, kies nomo signifas „batalantoj de la destino”, estis fondita en 1918 de Éamon de Valera, „patro” kaj prezidanto de la moderna Irlando. Ekde 1932 FF estis la plej potenca partio, dumlonge identigata kun la nacio. Ĝi okupis lokon en la vivo de la nacio, kiu ofte ŝajnis nevenkebla.

Kvankam FF valore servis la nacion, precipe per modernigo de la infrastrukturo, en postaj jaroj ĝi fariĝis korupta kaj nepotisma. Tiam ĝi fariĝis la plej malpopulara registaro en la historio de Irlando.

La due plej granda politika partio estas Fine Gael [fina gaejl] („la irlanda raso”). Tiu ĉi ideologie kristandemokrata partio estis fondita en 1933 kaj en la daŭro de la jaroj fariĝis modera centrisma partio.

Ambaŭ partioj, FF kaj FG, estiĝis, kiam la granda plimulto de la loĝantaro estis katolika, kaj profunde konservativa. Ambaŭ akceptis la hegemonion de Vatikano kaj sekvis dekstremulan politikon. La ideologia diferenco inter la du partioj estas preskaŭ nula, sed tradicie iliaj respektivaj adeptoj estis fervoraj, kaj ofte amaraj, rivaloj. Ofte oni ironie priskribis ilin kiel interbatalantajn tribojn, similajn al la antikvaj klanoj de la gaejoj.

Maldekstra influo

Ĝis nun la sola alia relative granda politika grupo en Irlando estis la La-

borista Partio (LP, ideologie socialdemokrata). Ĝi estis establita en 1912, kiel partio de la irlandaj sindikatoj, kies membroj estis industriaj laboristoj. Pro la fakto, ke tiam la lando estis precipe agrikultura kaj havis nur malmultan industrion en Dublino kaj en kelkaj aliaj urboj, LP neniam estis tre forta kaj apenaŭ etendiĝis tra la lando.

En la lastaj jaroj, tamen, la influo de maldekstra politiko komencis kreski. Krom LP, diversaj socialistaj grupoj igis sin pli kaj pli videblaj. Ĝis antaŭ la ĉi-jara elekta kampanjo, tiuj grupoj komencis paroli inter si pri la eblo formi unuiĝintan socialistan partion. Tio estas tute nova fenomeno en la Verda Insulo, ĉar eĉ LP neniam povis esti rigardata kiel vera socialisma partio en la marksisma senco.

Laborlingvo

Eĉ dum la elekta kampanjo oni observis simptomojn de gravaj ŝanĝoj en la konduto de la politikistoj. Ekzemple, en la parlamento, kiu ĝis nun estas pala imitaĵo de la brita, la lingvo de laboro kaj debato kutime estas la angla, kvankam la irlanda (gaela) kelkfoje estas uzata. Do la publiko ege surpriziĝis, kiam la unua televida debato de ĉi tiu kampanjo, inter la ĉefoj de la partioj FF, FG kaj LP, estis flue kaj elokvente farita tute en la irlanda lingvo.

Oni miris, ke gravuloj, kiuj tiom majstras la etnan idiomon, tiom malofte estas aŭdataj publike paroli en la oficiala lingvo de la ŝtato. La evento estis bonvenigita kiel indiko, ke inter la gvidantoj de la nacio estas nova respekto al lingvo, kiu ĝis nun estis buŝe agnoskata kiel unua oficiala idioma, sed estis praktike neglektata de la politikistoj.



Banko de Irlando - elirejo (fino?)

Nun inter la tri partioj regas konsento, ke la parlamenta sistemo estu reformita por krei vere demokratian asembleon, kie ĉiuj membroj havas voĉon kaj influon. Ĝis nun tio ne estis la situacio en la Dáil [dojl], la irlanda parlamento, kie membroj, kiuj ne estas ministroj aŭ ĉefoj de partioj, apenaŭ havas la permeson paroli aŭ demandi.

Sendependaj kandidatoj

Alia novaĵo dum la ĉi-jara elektado estis longaj balotpaperoj kun la nomoj de multaj sendependaj kandidatoj. Jen pruvo, ke homoj ne plu fidis al la ekzistantaj partioj. Alia notindaĵo estas la sukceso de la partio Sinn Féin [ŝin fejn]. SF estis en Nord-Irlando la politika alo de la neleĝa armita Irlanda Respublikisma Armeo.

Multaj sud-irlandanoj malfidas la partion, sed SF argumentis, ke ĝi rezignis pri perforta aktiveco kaj eĉ sukcesas kamarade kunlabori en la nord-irlanda asembleo, eĉ kun iamaj malamikoj. Spertoj tiaj, laŭ la partio, utilos ankaŭ en la Respubliko.

Ĝia ideologio estas maldekstrema, naciista kaj respublikisma, kio ebligas kunlabori kun aliaj socialismaj grupoj. SF malakceptas la financajn aranĝojn kun la Eŭropa Centra Banko, IMF kaj aliaj financaj fondusoj, kiuj



Irlanda parlamento

certe kaŭzos grandan suferon al la irlanda popolo, precipe al la malpli bonstataj.

Jen la rezultoj, laŭ partioj, de la 2011-elektado:

FF	20
FG	77
Laborista Partio	37
Verda Partio	0
SF	14
Aliaj	14
ULA (Socialistoj)	5

Antaŭvidata estas koalicio de FG kaj LP. Ĝis nun Irlando havis malkontentigan sperton, kiam ĝi estis regata de koalicio, en kiu unu partnero estis pli forta ol la alia.

En tiaj okazoj la majoritata partio emas superregi, kaj la malpli granda riskas neniigon, kiel okazis ĉe la lasta koalicio de FF kaj VP. Ĉe antaŭa koalicio de FF kaj PD (Progresema Demokrata Partio), la laste menciita tiom ŝrumpis, ke ĝi ne plu ekzistas kiel politika grupo.

Garvan MAKAJ

Kelkajn tagojn post la elekto estis kreita koalicio ja el la partioj – kiel prognoze – Fine Gael (modere dekstrema) kaj la Laborista Partio (modere maldekstra). En la elektado sukcesis 76 FG- kaj 37 LP-kandidatoj: LP estas do la minoritata partnero en la registaro.

La irlanda publiko estas dividita en sia reago al ĉi tiu aranĝo. Kelkaj sindikatoj kaj aliaj maldekstruloj preferus, se LP estus farinta aliancon kun la diversaj socialistoj grupoj kaj estus restinta opozicia partio. Samtempe, aliaj homoj proponis koalicion de FG kaj sendependuloj – apenaŭ praktika solvo pro diverseco de ideologioj.

Pesimistoj atentigas, ke ambaŭ antaŭaj irlandaj koalicioj estis ege malsukcesaj. Pro tio, espero pri la sukceso de la nova registaro ne estas ĝenerala.

Fino de ministreco: kroniko

La plej populara kaj ŝatata politikisto de Germanio estas Karl-Theodor Freiherr (barono) von und zu Guttenberg, mallonge zu Guttenberg [cu gutnberk].

Tion pravas enketoj, laŭ kiuj en februaro 2011 ĉ. 68 % de la elektantaro kontentis pri lia agado kiel ministro pri defendado. En januaro estis eĉ 76 %. Zu Guttenberg estas membro de la regiona partio CSU, kiu kun sia frata partio CDU kaj kun FDP konsistigas la federacian registaron de Germanio.

Al la ioma malkresko de lia populareco en februaro kredeble kontribuis serio de eventoj. Ĝi komenciĝis en februaro 2007, kiam zu Guttenberg sukcesis en la doktora ekzameno pri juro ĉe la universitato Bayreuth. En januaro 2009 li publikigis sian doktoriĝan disertaĵon.

Citaĵoj

Komence de 2011 Andreas Fischer-Lescano, profesoro pri ŝtata juro, verkis recenzon pri la disertaĵo. Li konstatis, ke partoj estas deprenitaj de aliaj verkoj kaj ne markitaj kiel citaĵoj. Tio kontraŭas sciencistajn principojn, la universitatan regularon kaj honor-parolan deklaron de zu Guttenberg. La 12an de februaro Fischer-Lescano informis la du ekspertizistojn de la disertaĵo kaj la super-regionan ĵurnalon *Süddeutsche Zeitung*.

La 16an de februaro la ĵurnalo publikigis la riproĉon, kune kun komento de la ministro. Tiu ĉi samtage deklaris, ke la riproĉo pri plagiato estas „malklara” aŭ „konfuza” (germane: *abstrus*). Tamen estus malfacile pli klare esprimi, ke li trompis pri la akiro de doktoreco, sed eble li volis diri „absurda”, aŭ celis, ke tion oni komprenu.

Ĵurnalistoj

La 18an de februaro zu Guttenberg deklaris, ke li neniam konscie trompis pri sia disertaĵo kaj atendas, ke lia universitato kontrolu la aferon. Ĝis tiam li dume (emfaze, dume) rezignos pri la uzo de sia doktora titolo. Tiun deklaron li faris antaŭ manpleno da invititaj ĵurnalistoj. Samtempan gazetaran konferencon de la registaro li ne partoprenis.

La 20an de februaro okazis provincaj balotoj en Hamburgo. La partio CDU (CSU ne kandidatas en Hamburgo) perdis duonon de siaj 56 deputitoj. Tiu malsukceso kredeble ne estas atribuebla al zu Guttenberg.

Sed la balotrezulto estis klara signo, ke CDU/CSU estas en krizo. En Germanio ĉi-jare okazos ses pliaj provincaj balotoj: la partioj nun tute ne ŝatas negativajn novaĵojn.



La plej populara kaj ŝatata politikisto de Germanio estas Karl-Theodor Freiherr (barono) von und zu Guttenberg, mallonge zu Guttenberg [cu gutnberk].

Trompo

Supozeble nur tio ĉi klarigas, ke la sekvan tagon la federacia kanceliero (= ĉefministro) de Germanio, Angela Merkel, en gazetara konferenco deklaris, ke ŝi subtenas sian plagiaturan ministrin. Ŝi diris, ke ŝi „alvokis nek sciencan asistanton, nek doktoriĝanton aŭ posedanton de doktora disertaĵo”, sed ke por ŝi gravas la laboro kiel federacia ministro pri defendado.

La fakton, ke oni riproĉas la trompon de zu Guttenberg, ne lian eblan ne-doktorecon, ŝi prisilentis. Je la sama tago nova retejo *GuttenPlagWiki*, kiu esploris la disertaĵon, publikigis, ke sur 271 paĝoj el 475 estas trovitaj plagiataĵoj, ampleksantaj pli ol kvinonon de la verko. Poste, *GuttenPlag* informis, ke iom pli ol 8000 linioj de la disertaĵo (el 16325) estis identigitaj kiel plagiataĵoj.

Fontoj

Samvespere zu Guttenberg deklaris, ke li eble jen kaj jen perdis la super-rigardon pri la fontoj de sia verko. Li definitive ne plu uzos la doktoran gradon. La 23an de februaro la universitato Bayreuth forprenis de zu Guttenberg la doktorecon kaj deklaris partojn de lia disertaĵo kiel plagiatojn, sed ne kulpigis lin pri intenca trompo.

La 24an de februaro la prezidanto de la federacia parlamento, Norbert Lammert (CDU), informis, ke zu Guttenberg ĉe la parlamenta sciencista servo mendis ses fakulojn kaj preskaŭ komplete uzis iliajn tekstojn en sia disertaĵo, kvankam tiaj fakuloj subtenu nur la parlamentan laboron de la deputitoj. Poste montriĝis, ke estis plia, sepa, fakulo. La sciencistan servon, evidente, pagas la germana popolo per siaj impostoj.

Titolo

Tiutempe montriĝis klara disdueco de la publika opinio. Sciencistoj kaj homoj kun universitata klereco opiniis, ke eĉ ministro ne rajtas trompe akiri akademian titolon, por kiu aliaj devas pene labori. Aliaj popoloj emis opinii, ke la

trompo estas bagatela kaj ke la kritikantoj nur envidas la sukceson kaj la popularcon de zu Guttenberg.

Ĝenerale tiu dua grupo montris la sintenon esprimitan de la kanceliero, ke trompo en scienco ne koncernas la ekster-universitatan mondon. Al la unua grupo apartenis eĉ eminentuloj el CDU, ekzemple Kurt Biedenkopf, profesoro pri juro kaj eksa provinca ĉefministro, kaj Annette Schavan, ministro pri klerigado.

Demisio

Kiam jam ŝajnis, ke la registaro fidos al sia trompinta ministro kaj savos lian karieron, la 1an de marto zu Guttenberg petis la kancelieron eksigi lin el la ministraro kaj li rezignis pri siaj oficoj. Kiel motivon li indikis, ke la kritiko pri li malutilas al la soldataro, kaj ke li ne volas pri tio respondeci. Samtage la kanceliero akceptis la demision.

Zu Guttenberg estas malpli ol 40-jara, kaj multaj supozas, ke post deca intertempo li povos komenci duan karieron kaj eble iĝi kanceliero de Germanio.

Eble la fakto, ke li trompis, ne malhelpas tion. Sed kio pri lia nekapablo kompreni sian situacion kaj sian kulpon?

Reformo

Eble decas rigardi ankaŭ la germanan armeon, kies estro estis zu Guttenberg. Ĝi nun, pro reformo lia, akceptas nur volontulajn soldatojn. Je la tago de la demisio de zu Guttenberg konatiĝis, ke por aprilo 2011 anoncis sin nur dekono de la bezonataj volontuloj (306 el 3077).

Por plibonigi la situacion la ministerio planas ampleksan varb-kampanjon, utiligante precipe komunikilojn de la eldonejo Axel Springer. Jürgen Trittin, parlamenta frakciestro de la verdula partio, atentigis, ke ĝuste tiu eldonejo ĉiam fidele subtenis zu Guttenberg. La eldonejo deklaris, ke la reklam-anonca kaj la redakta fakoj laboras strikte aparte.

Reinhard FÖSSMEIER



Artikolojn pri la politiko en via regiono sendu al politiko@monato.net.

EMERITIĜO

Labori pli, enspezi malpli.

En Hispanio, kiel en multaj aliaj landoj, registaroj alfrontas pensio-problemon: la popolo maljuniĝas, pli longe vivas, dum mankas sufiĉe da pli junaj homoj por finance subteni la gepatran, la geavan generacion.

Pro tio la hispana registaro, supoze maldekstra, subskribis antaŭ malmultaj semajnoj interkonsenton kun la ĉefaj sindikatoj por reformi la landan pensian sistemon. Kiel pravigon ĝi uzis diversajn ekonomiajn esplorojn, kiuj asertis, ke neelteneblas la nuna sistemo kaj ke ekzistas granda risko pri baldaŭa bankroto.

La interkonsenton akompanis forta kampanjo de la amaskomunikiloj favore al la reformo kaj de premoj el diversaj

grupoj, inkluzive de bankoj kaj aliaj investistoj.

Prokrasti

Du gravajn punktojn havas la reformo: prokrasti la emeritiĝon de 65 al 67 jaroj kaj plilongigi de 15 al 25 jaroj la periodon de labora vivo uzatan por kalkuli la pension. Tio signifas, ke la mezuma pensio malgrandiĝos inter 20 kaj 25 %.

Nuntempe en Hispanio 77 % de la pensiuloj estas salajrataj per malpli ol 1000 eŭroj. La kontribua mezuma pensio en Hispanio estas nur 63 % de la averaĝo de 15 landoj de la Eŭropa Unio. Krome Hispanio estas unu el la eŭropaj landoj, kiuj havas plej grandan elcenton

de pensiuloj „kun la risko de relativa malriĉo”, nome 19,3 %, kvar poentojn super la averaĝo de EU-15 (15,3 %).

Fantazio

Cetere la elcento de senlaboruloj en Hispanio superas 20 %. La junulara senlaboreco estas la plej alta de Eŭropo (40 %); alta estas ankaŭ la nombro de portempaj kontraktoj. Pro tio la ebleco labori tuttempe por atingi plenpension emeritiĝon je 65 aŭ 67 jaroj estas fantazio. Eblas simple resumi: „Labori pli por enspezi malpli”. Pro tio estas malĝoje, vidi kiel gravaj sindikatoj kaj maldekstra registaro akceptas sendiskute la neelteneblecon de la pensia sistemo.

La sola espero estas, ke sur la politika kaj sindikata niveloj kuniĝos fortoj malaprobantaj la dekstrajn, novliberalajn paŝojn de la registaro. Hispanio staras meze de civitana konsciiĝo por defendi la ĉiam pli malaltan socialan ŝtaton.

Jesuo GONJUE

BELGIO

Divers(ec)aj rakontoj

Tensioj inter flandroj kaj franclingvanoj en Belgio kreskis al ĝis nun nekonata nivelo. Ekzemple, nederlandlingvanoj ĉagreniĝas, kiam franclingvanoj ne konas la nederlandan kaj konsideras tion normala. Triono de la flandroj diras, ke ne eblas kunlabori kun franclingvanoj. Laŭdire flandroj volas progresi kaj franclingvanoj ne. Aliflanke franclingvanoj opinias, ke flandroj kondukas krude kaj malĝentile kaj rifuzas paroli la francan. Flandroj opinias, ke la lingvolimo inter la komunumoj estu fiksa, dum franclingvanoj opinias tion absurdaĵo.

Jen kelkaj el la plendoj, kiuj ofte ripetigas en Belgio. Kaj pro la diversaj opinioj ofte okazas debatoj. Oni povas supozi, ke ili helpas pli bone sin kom-

preni kaj pliproksimigi la vidpunktojn. Sed diskutoj kaj debatoj havas kelkajn gravajn malavantaĝojn.

Dum debatoj oni kutime mobilizas siajn kapablojn ne por kompreni la aliajn, sed por pruvi la malpravon de kontraŭulo. La argumentoj ofte estas malkonkretaj. Oni ofte interrompas la pledojn. Ĉefe, nur kelkaj homoj vere interkonsiliĝas, dum formiĝas silenta plimulto, kiu tute ne esprimas sin.

Eksperimento

En la kadro de projekto por eŭropa interkultura dialogo kaj integriĝo du belgaj sociologoj, Mark Elchardus [mark elĥardus] de la brusela nederlandlingva universitato kaj Olivier Servais [olivié servé] de la franclingva universitato en Louvain-la-Neuve, eksperimentis per alia metodo. Ili arigis 56 personojn, kiuj reprezentas tipan grupon de belgoj.

La arigitoj kunvenis en kvin sesioj. Oni petis ilin verki kaj poste eldiri rakontojn, komence malfavorajn, poste favorajn, koncerne la belgan lingvodiversecon. Rapide kaj ofte aperis malfavoraj,

dum malpli ol duono de la rakontoj estis favoraj. Krome ili estis malpli longaj.

Analizo

Oni analizis la rakontojn kaj priparolis la rezultojn kun la verkintoj, komence etgrupe, poste tutgrupe. Por la partoprenantoj la rakontado montriĝis terapia: finfine ili povis libere esprimi siajn frustraciojn. Poste la partoprenantoj estis pli malfermaj al la argumentoj de alilingvanoj kaj eĉ sukcesis formuli komunajn proponojn.

Tiu ĉi eta grupo evidente ne povas havi signifon por la enlanda etoso. Sed se lernejoj kaj kulturaj societoj regule organizus tiajn interŝanĝojn de rakontoj, tio ja povus kontribui al interkompreniĝo. Tial, laŭ la proponoj de partoprenintoj, gravas komunikiloj.

Sed en raportoj pri la eksperimento kelkaj gazetoj elektis emfazi la antaŭjuĝojn esprimatajn de partoprenantoj. Ili do ne komprenis (aŭ ne volis kompreni) la celon de la iniciatintoj.

Ivo DURWAELE

Stirante ĉirkaŭ ŝtopiĝoj

Pekino komencis novan rime-don por mildigi trafikŝtopiĝojn per limigo de aŭto-aĉetado. Ĉi-jare 240 000 aŭtoj estas aĉeteblaj kaj aĉetontoj devas unue registri sin en la retpaĝaro www.bjhtyd.gov.cn por peti permeson akiri aŭton.

De la 1a ĝis la 8a de januaro entute 210 000 homoj registris sin, kaj 180 000 el ili estis kvalifikitaj al lotumo por kvoto de 17 600 aŭtoj. La tuta lotumado estis televide kaj interrete elsendata. Interesatoj povis kontroli la rezultojn rete aŭ telefone tuj post la lotumo.

Laŭ la regularo ĉiu gajninto devas aĉeti aŭton ene de ses monatoj. Se ne, la lotumita numero malvalidiĝos. Sed ne ĉiu gajninto volas tuj aĉeti aŭton, ĉar iuj deziras sperti la proceduron.

Efikaj rimedoj

Ĝis decembro 2010 troviĝis en Pekino 4,7 milionoj da motorveturiloj kaj pli ol 6,2 milionoj da registritaj stirantoj. Oni taksis, ke la nombro de pekinaj aŭtoj atingos sep milionojn en 2015. Se oni ne prenos efikajn aranĝojn, tiam la trafikŝtopiĝoj ĉiutage daŭros pli ol ses horojn kaj aŭtoj ĉiuhore veturos nur 15 kilometrojn.

Por eviti ŝtopiĝojn Pekino lanĉis multajn iniciatojn. Ekzemple, aŭtoj alterne veturas en ĉiu tago laŭ siaj numeroj; la magistrato konstruigas pli da subteraj fervojoj; kaj la loĝantoj estas petataj uzi publikajn transportilojn anstataŭ ol stiri siajn proprajn aŭtojn.

Alice Liu



Por eviti scenojn tiajn Pekino lanĉis plurajn iniciatojn.

Stela „his”torio



Nenia koloro-kolero pri la samstriaĵ, samkoloraj flagoj de Litovio kaj Birmo.



En Litovio oni miris, kiam en Birmo oni hisis novan flagon: la koloroj – tri samlarĝaj horizontalaj strioj flava, verda kaj ruĝa – similas al tiuj de la litova flago. Nur la koloroj en la litova flago estas iom pli helaj – kaj blankan kvinpintan stelon surhavas la flago de Birmo.

Juristo ĉe la universitato Mykolas Riomeris ŝerce diris, ke la samkolora flago realigas la revon de multaj litovoj en la intermilita periodo posedi kolonion en Madagaskaro. Tamen pli serioze aldonis la juristo: „Elekti flagon estas interna afero de ĉiu ŝtato. Internacia juro tiun ĉi demandon ne pritraktas.”

LAST

Artikolojn pri la vivo
en via regiono sendu al
moderna_vivo@monato.net

Plaro, aŭ la Flava Terpomo

„Megalopolo” estas reto de urboj multkerna, grapol-forma. Principe ĝi enhavas pli ol 10 milionojn da loĝantoj kaj densan reton de variaj transport-rimedo: akvo-, fer- aŭ aŭto-vojoj. Tiun urbegan koncepton inventis la geografo Jean Gottmann per sia samnoma verko (*Megalopolis*, 1961).

La nomon „megalopolo” li donis unue al la granda urbaro de la koridoro Bostono-Vaŝingtono en la nord-orienta Usono. Ĝi krome entenas, inter aliaj, la urbojn Novjorko, Filadelfio kaj Baltimoro. Tiu urba koridoro, poste nomita Bosvaŝo (anglalingve Boswash), estas 800 kilometrojn longa kaj kuŝas laŭlonge de la atlantika marbordo.

Marbordoj

Post Bosvaŝo oni identigis diversajn megalopolojn ie tie en la mondo. La noktaj satelitfotoj bone evidencigas tiujn lumigitajn urbajn koncentraĵojn, plejofte laŭlonge de marbordoj: Tajhejo (Tokaido-koridoro en Japanio, kiu iras ĝis Fukuoka), Sanfrancisko–Sandiego en Kalifornio (Sansan, pasanta tra Losanĝeleso), Rio–San-Paŭlo en Brazilo ktp.

Ja Bosvaŝo elstaras en tiu megalopola listo, ne tiom laŭ sia loĝantaro (ĉirkaŭ 50 milionoj da loĝantoj; la japana megalopolo enhavas pli ol 100 milionojn), kiom pri la koncentriĝo de diversaj tutmondaj institucioj – Unuiĝintaj Nacioj, la Monda Banko, la Internacia Mona Fonduso – aldone al aliaj nur usonaj – la Blanka Domo, Pentagono aŭ *Wall Street*. Gottmann nomis Bosvaŝon la „moderna Romo”. Ekde la komenco de la 21a jarcento grandrapida trajno interrilatigas ĝiajn ĉefajn urbojn.

Valo


Kelkajn jarojn post Gottmann, la geografo Roger Brunet identigis en Eŭropo gravan megalopolan akson, aŭ „arkon”, demografian kaj ekonomian, kiu iras de Anglio ĝis norda Italio, sekante la valon de Rejno. En verko dediĉita al eŭropaj urboj li ĝin nomis la Eŭropa Spino (*La dorsale européenne*, 1989).

Komence de la jaroj 2000 la nomo „Blua Banano” famiĝis (vd. diversling-

van Vikipedion). Sed tiu ensemblo, kiu estas pli ol 1000 kilometrojn longa kaj 200 larĝa, trafas la obstaklon de la Alpoj, aspektas grandega, sekve mal-kohera. La difina limo pri megalopolo ŝajnas iom transpasita.

Esploro

Tamen, bone serĉante, eblas vidi eŭropan megalopolon notinde malpli grandan, sekve pli koheran. Pri tiu lasta



Bruselo estas kvazaŭ centre de la Plaro-regiono. Necesas malpli ol du horoj por iri trajne de Bruselo suden ĝis Parizo, norden ĝis Amsterdamo, okcidenten ĝis Londono kaj orienten ĝis Kolonjo, kiu estas la ĉefa urbo de la regiono Rejno-Ruro.

ekzistas ĝis nun, almenaŭ laŭ interreta esploro, neniu studaĵo. Ĝin formas kurbe fermita linio, kiu entenas sude Parizon kaj la valon de Sejno, ĉirkaŭas Londonon, poste Amsterdamon, la germanan metropolon Rejno-Ruro (unuan industriaran regionon de Eŭropo), kaj poste reiras suden ĝis Parizo.

Oni povas laŭplaĉe ĝin nomi Plar-o, laŭ la komencliteroj de ĝiaj ĉefaj aglomeraĵoj, aŭ „Flava Terpomo” laŭ ties desegno. La pli kompakta terpoma formo bone distingiĝas de la supre menciita „banano” kaj la koloro „flava” aspektas iomete pli realisma rigarde al nokta satelitfoto.

Haveno

Krom la kvar menciitajn urbojn, Plaro entenas aliajn gravajn kiel la kosmopolitan Bruselon en sia centro, la tiel nomatan „Randstad Holland” en kiu lokiĝas Roterdamo (unua okcidenta haveno, la kvara tutmonde), la havenon Antverpeno kaj la transnacion regionon Lille-Kortrijk-Tournai, nomatan „Eŭrometropolo”. Tiu lasta disvastiĝas sur du regnoj (Francio kaj Belgio) kaj pluraj lingvaj regionoj.

Plaro situas ĉirkaŭ tiu grava markolo, la plej uzata en la mondo, kiun la angloj nomas doŭra kaj la francoj kaleza (ankaŭ tie bedaŭrinde mankas tutmondaj konvencioj). Ĝi sekve havas riĉan historion: gravaj luktoj okazis tie, notinde la malvenko de la hispana „armada” (mararmeo) de Filipo la 2a en 1588, mezmare ĉe la franca haveno Gravelines (proksime al Kalezo), ankaŭ la decidiga batalo de Waterloo en 1815, kiu markis la definitivan

fiaskon de la imperia provo de Napoleono.

Plaro estas la plej masiva el ĉiuj antaŭe menciitaj tutmondaj megalopoloj. Ĝi entenas fekundajn grundojn favorajn al nutraĵa intensa agrikulturo. Precize tie okazis la tiel nomata agrikultura revolucio dum la 17-18a jarcentoj.

Pezocentro

Oni komparu Plaron kun Bosvaŝo. Ambaŭ havas proksimume saman loĝantaron. Ili montras areojn kompareblajn (la unua multe pli larĝan, la dua multe pli longan). Sed Plaro estas ja pli kohera, sinergia. Necesas malpli ol du horoj de Bruselo, ĝia kvazaŭa pezocentro, por atingi ties kvar ĉefajn aglomeraĵojn, danke al reto de grandrapidaj trajnoj, kompletigita de la manika tunelo inaŭgurita en 1994.

Oni notu krome, ke ekzistas sama reto de navigeblaj riveroj, kompletigita de grandtrafikaj kanaloj. Nuntempe oni traboras novan akvovojon en la norda Francio, kiu interrilatigos Sejnon kaj Skeldon. Nun okazas gravaj terfosaj laboroj por enterigi la francan aŭtovojon (A 29), forlasante superan lokon al tiu estonta kanalo.

Ludokartoj

Plaro kaj Bosvaŝo situas ambaŭflanke ĉe la norda Atlantiko, tiel markante la geopolitikan elstarecon de tiu planeda regiono. Kompare kun la amerika „moderna Romo”, la eŭropa megalopolo daŭre havas kelkajn bonajn ludokartojn. Londono daŭre estas la ĉefurbo de la Brita Regno kaj Parizo de la internacia

Franclingvio (*Francophonie*), ambaŭ heredintoj de la malnovaj koloniaj imperioj de tiuj konkurencaj ŝtatoj.

Samkiel Novjorko, Bruselo havas sian Tutmondan Komercean Centron (*World Trade Center*, tamen senteble malpli grandan ol tiu de Usono antaŭ septembro 2001). En la nederlanda urbo Hago sidejas notinde la Internacia Kortumo (kiu prefere ol juĝopovon havas arbitracian rolon).

Sidejoj

Oni povus longe paroli pri la variaj sidejoj, kiujn gastigas Plaro, institucioj kulturaj, ekonomiaj, politikaj, la senombraj kongresoj, internaciaj salonoj, la multnombraj vidindaĵoj. Estas menciindaj la organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko), kiu havas sian sidejon en Parizo, samkiel la Organizaĵo pri Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo (OEKE).

Kian estontecon havas tiaj grandaj homaj koncentriĝoj, ĉu en Eŭropo, ĉu aliloke? Ilin necesigis la industria revolucio, la rapida kaj akcela kresko de la loĝantaro kaj de la ekonomio. Nun, tiu fenomeno ŝajnas iom malakceli siajn efikojn. La ekonomia krizo, spertata ĉi-momente, koncernas ankaŭ tiujn grandajn centrojn, iam privilegiajn, al kiuj malriĉaj enmigrintoj daŭre alvenas.

Komunikiloj

De ili, inverse, multaj homoj tendencas hodiaŭ malproksimiĝi. Helpas ilin tiucele modernaj komunikiloj, ĉu materiaj (rapidaj trajnoj), ĉu virtualaj (interreto). La publikigo fare de Eŭropa Unio en 1999 de la Eŭropa Spaco-Disvolva Perspektivo (ESDP) iom esprimas tiun volon de malkoncentriĝo.

Samcelas la Eŭropa Spaca Plano de Observa Reto (ESPOR, en la angla ESPON), starigita ankaŭ de EU. En tiu lasta krome partoprenas Svislando. Oni pli kaj pli parolas pri policentrismo kaj tiu sistemo prezentas avantaĝon kompare kun la tradicia densa koncentriĝo de la grandaj megalopoloj. Oni sekvu kun intereso la evoluon de tiu afero.

Djémil Kessous



“Megalopolo” estas reto de urboj multkerna, grapolforma. Principe ĝi enhavas pli ol 10 milionojn da loĝantoj kaj densan reton de variaj transport-rimedo:

Fragmentoj de la dua mondmilito

Kiam oni vizitas antikvajn konstruaĵojn en Pekino, ekzemple la Grandan Muron, la Imperiestran Palacon kaj la Halon de Preĝo por Riĉa Rikolto, oni ofte miras, kiel ĉinoj povis starigi sen maŝino tiel imponajn konstruaĵojn. Tia miraklo aperis ankaŭ en la moderna Ĉinio. En la jaro 1938 diversaj konstrumaŝinoj jam aperis en la mondo, tamen estis neniu buldozo dum la konstruado de la ŝoseo inter la provinco Junano, sud-okcidenta Ĉinio, kaj Birmo.

En 1937 Japanio lanĉis militon kontraŭ Ĉinio. La japana armeo okupis la nordan, oriantan kaj sudan regionojn de Ĉinio, kaj ĉiuj marhavenoj falis en la manojn de Japanio. Restis nur la havenoj en Honkongo kaj Vjetnamio, tra kiuj la aliancanoj povis provizi ĉinajn trupojn per armiloj kaj aliaj necesajoj.

La ĉina registaro sub la regado de la partio Kuomintang decidis malfermi novan internacian vojon en la postfronta regiono, ĉar ĝi timis, ke Japanio eble blokos la du trairejojn. La tiam ĉina gvidanto Ĉiang Kaiŝek akceptis la proponon de Long Jun, estro de la provinco Junano, konstrui la ŝoseon inter Junano kaj Birmo kiel novan trairejon por transporti proviantojn de aliaj landoj al Ĉinio. La ŝoseo longis 1453 kilometrojn kaj kondukis de la provinca ĉefurbo Kunmingo al Laŝio, Birmo.

Agreso

Ĉinio konstruis la sektion longan je 960 kilometroj inter Kunmingo kaj Ŭanting, ĉe la landlimo kun Birmo, el kiuj 411 inter Kunmingo kaj Dali estis konstruitaj jam antaŭ la milito. Ĝi estis la sola internacia trairejo por Ĉinio dum

la milito kaj forte subtenis la batalon de la ĉina popolo kontraŭ la japana agreso. Tiusence neniu alia ŝoseo povas esti tiel strikte ligita kun la sorto de Ĉinio kaj tiel longe freŝa en la memoro.

En decembro 1937 Ĉinio tutmonde adjudikis la konstruon de la ŝoseo. Kelkaj internaciaj kompanioj interesiĝis pri ĝi kaj promesis, ke la konstruo estos finita post sep jaroj, se Ĉinio povas liveri freŝajn maŝinojn. Al Ĉinio mankis tiuj maŝinoj, kaj la sep-jara daŭro estis neakceptebla por Ĉinio fronta al la urĝa situacio. Ĉinio decidis konstrui la ŝoseon per sia propra forto.

En januaro 1938 fondiĝis stabo de la konstruo. Komence la mezurado iris en tre malfacilaj cirkonstancoj. Pro manko de kvalifikitaj profesiuloj, la stabo varbis en Kunmingo aron da senlaboraj intelektuloj rifuĝintaj el aliaj lokoj kaj trejnitis ilin. Poste ili fariĝis ĉefaj teknikistoj en la konstruejo. La Printempa Festo de la jaro 1938 proksimiĝis. Tiam 200 000 laboristoj el diversaj etnoj laŭlonge de la ŝoseo estis varbitaj kontraŭ malmulta pago. Ili plejparte estis maljunuloj, infanoj kaj virinoj kaj mane laboris pro la manko de maŝinoj en tre malfacilaj kaj danĝeraj kondiĉoj. La ŝoseo ekfunkciis en la fino de tiu jaro.

Bombi

Sed kvieta tempo estis mallonga por la ŝoseo. Jam en la komenco la japana armeo remaĉis diversajn planojn por tranĉi la ŝoseon, la solan trairejon de internaciaj helpmaterialoj al Ĉinio. Tiel Japanio intencis kapitulacigi la tiaman registaron de Ĉinio. En la jaro 1940 la japana armeo okupis Vjetnamion kaj prenis ĝin kiel bazon por bombi la



ALICE LIU

La junan-birma ŝoseo estis permane konstruita.

ŝoseon. Ĝi starigis specialan komitaton por bloki ĝin.

Ekde oktobro 1940 dum malpli ol kvar monatoj la japana armeo sendis entute pli ol 400 aviadilojn por bombi pontojn de la ŝoseo. Ĉiufoje post la bombado la konstru-brigado komencis intensan riparon, kaj iam bombado kaj riparo okazis samtempe.

La 23an de januaro 1941 japanaj aviadiloj bombis 14 fojojn la ponton Ĉanggan super la rivero Lancang kaj komplete detruis ĝin. La japana radio fiere proklamis en Tokio: „La junan-birma ŝoseo estas tranĉita kaj oni ne povas restarigi ĝin ene de tri monatoj”.

Mesaĝo

Informiĝinte pri tio, ĉinoj en la postfronta regiono estis tre maltrankvilaj. La ĉina ministerio pri komunikado tuj urĝis la konstru-brigadon rapide restarigi la ŝoseon. Estas emocie, ke post nelonge la ministerio ricevis ekzaltan mesaĝon, ke la ŝoseo estas denove malfermita, kaj aŭtovicoj sukcese trapasis la torentan riveron Lancang.

Du monatojn antaŭe la lokaj inĝenieroj prognozis, ke la ponto probable detruigis pro la ofta bombado de la japana armeo. Tial ili kunligis 70 malplajn benzinbarelojn kiel unu flosan




„Fluganta tigo” – aviadilo de la Usona Volontula Grupo.



Rivero Nugjiang – unu el la obstakloj, kiun devis venki la ŝoseistoj.



Super la montaro Himalajo flugis usonaj aviadistoj – kaj multaj pereis.



La memor-muzeo de la Usona Volontula Grupo.

kaj tiel faris kelkajn. Sur tabuloj la flusoj fariĝis simplaj pramoj de aŭtoj, kaj oni veturigis ilin per ligitaj ŝnuroj ĉe la du bordoj de la rivero.

Meze de 1942 la japana armeo okupis la monton Songŝan ĉe la okcidenta bordo de la rivero Nugjiang, kaj pro tio la ĉina armeo detruis la ponton Huitong. La junan-birma ŝoseo fine interrompiĝis, kaj Ĉinio perdis 90 % de la armiloj kaj aliaj helpmaterialoj necesaj al la armeo.

Ĝiba aerlinio

En decembro 1941 eksplodis la Pacifika Milito, kaj Usono ekbatalis kontraŭ Japanio. Pro la interrompo de la junan-birma ŝoseo, por transporti strategiajn materialojn al la ĉina armeo, Ĉinio kaj Usono malfermis 800-kilometran aerlinion inter Asamo, nord-orienta Barato, kaj Kunmingo, Ĉinio. La kargoaviadiloj ĉiutage superflugis la montaran regionon Himalajo je averaĝa altitudo de 4 500 ĝis 5 500 metroj. Oni nomis la aeran trairejon ĝiba aerlinio, ĉar la superflugita montaro aspektas kiel ĝiboj de kamelo.

La flugo estis kvazaŭ memmortigo por la pilotoj pro tre malfacilaj kondiĉoj, ŝanĝiĝema vetero kaj surprizataĵoj de japanaj aviadiloj. Dum tri jaroj la aviadiloj transportis al Ĉinio 800 000 tunojn da materialoj kaj 33 477 soldatojn malgraŭ tio, ke pli ol 600 aviadiloj kraŝis kaj 1500 usonaj pilotoj pereis.

Vrakoj

Unu el la pilotoj de la Usona Volontula Grupo rakontis al la grupestro Claire Lee Chennault [kle li ŝenó], ke en serenaj tagoj dum la flugo li povas klare vidi reflektantajn vrakojn de kraŝintaj aviadiloj, tial li kaj liaj kolegoj nomis la valon, en kiu troviĝas la vrakoj, aluminia valo.

Kelkajn tagojn poste tiu piloto eterne ekuŝis tie kun siaj kolegoj. La pilotoj ofte flugis al la aluminia valo por serĉi pecojn el kraŝintaj aviadiloj por riparo. Eĉ nuntempe lokaj vilaĝanoj aŭ esploristoj ankoraŭ povas trovi restaĵojn de la pilotoj.



Post la kapitulaco estis konstruita memor-arkaĵo.

Propono

Komence de julio 1937 Chennault atingis Ĉinion por esplori la ĉinan aer-armeon. Kelkajn tagojn poste Japanio komencis invadi Ĉinion. Akceptinte la proponon de Soong Meiling, edzino de Ĉiang Kaiŝek, Chennault establis aviadan lernejon en la antaŭurbo de Kunmingo por trejni ĉinajn pilotojn laŭ la normo de la usona armeo. Danke al malpublika helpo de la usona registaro li varbis pilotojn kaj maŝinistojn el Usono, promesante altan salajron, nome de privata institucio.

Poste pli ol 200 usonanoj venis al Ĉinio. Ili plejparte estis junuloj bravaj, aventuremaj kaj senĝenaj. Ĉar ili ne estis soldatoj, la taktiko kaj trejniĝo estis pli liberaj. Post nelonge ili unuafoje batalis kontraŭ la japana armeo kaj venkis. Krome, ili helpis Ĉinion starigi sian aerarmeon kaj transportis helpmateriaĵojn de Barato al Ĉinio. Ĉinoj nomas ilin „grupo de fluganta tigo”, ĉar iliaj aviadiloj havis ŝarko-forman kapon kun signo de flugilhava tigo.

Memor-halo

La Halo Memora al Akcepto de la Japana Kapitulaco troviĝas 3,5 kilometrojn for de Ĝigjiang, provinco Hunano. La 15an de aŭgusto 1945 la japana registaro akceptis la Deklaracion de Potsdamo kaj senkondiĉe kapitulacis. La 21an de aŭgusto la ĉina registaro de Kuomintang okazigis ceremonion por akcepti la kapitulacon de la japana armeo.

Poste la registaro de Kuomintang

konstruigis tie arkaĵon por memori tiun historian momenton. Nun ĝi fariĝis vidindaĵo, kaj ĉiujare okazas internacia paca kaj kultura festivalo en la gubernio Ĝigjiang por memori la venkon en la kontraŭfaŝisma batalo.

Aerodromo

Oni elektis la gubernion Ĝigjiang kiel ceremoniejon de la kapitulac-akcepto pro tio, ke tie estis la dua plej granda aerodromo de la trupoj de la aliancita armeo en la Ekstrema Oriento.

Tie ankaŭ garnizonis la Usona Volontula Grupo sub la komando de generalo Claire Lee Chennault kaj korpusoj de Kuomintang.

Dum la milito la aerodromo ludis tre gravan rolon. Tie la ĉinaj aviadiloj ekflugis kaj lanĉis atakojn al gravaj celoj de la japana armeo. La 15an de aŭgusto 1945 la homoj de la gubernio finfine vidis la venkon post longa sufero, kaj Ĝigjiang fariĝis tre memorinda loko de la monda kontraŭfaŝisma batalo.

Alice Liu



Aviadisto-grupestro Claire Lee Chennault.

Adiaŭas fenomeno

La 14an de februaro Ronaldo, brazila futbolisto alnomita „Fenomeno”, anoncis sian emeritiĝon. La kolektiva intervjuo okazis en la sidejo de *Corinthians* (Korintanoj), historia klubo de la urbo San-Paŭlo. Videble emociita, la futbolisto ne eltenis larmojn dum la deklaroj. La 34-jarulo rezignis pri sia glora kariero pro ne sufiĉe bona sanstato. Li suferas pro hipotiroidismo, kies kuracilo estas hormono, substanco malpermesata al sportisto. Tamen ne uzi ĝin signifas dikigi.

Driblanto

Laŭlonge de 18 jaroj da profesia dediĉo al futbalo li konstruis solidan karieron. Kiel lerta avanulo de rapidegaj kaj embarasigaj dribloj li surmetis la kolorojn de sep kluboj, el ili du brazilaj kaj kvin eŭropaj. Entute li faris 352 golojn en interklubaj disputoj. Menciindas la aparta atingo ĉe eŭropaj teamoj, kie li ĉefrolis la finan venkon en ne malpli ol naŭ ĉampionadoj.

Bildigis tiun plensukcesan vojon la flava ĉemizo de la nacia teamo de Brazilo, precize la numero 9. Lia emo goli forte kontribuis por la venkoj de Brazilo en du mondaj ĉampionadoj (1994 kaj 2002) el kvar, en kiuj li partoprenis. Neniu antaŭ li tiom golis en futbala monda pokalo. Nur li kaj la franco Zinedine Zidane ricevis tri fojojn la distingon kiel la plej bona futbolisto de la mondo fare de la Federacio Internacia de Futbalo (FIFA).

Skandaloj

Tamen skandalo ne malofte akompanas famulojn. Lin trafis almenaŭ du. La unuan li travivis en la fina matĉo de la monda futbala pokalo de 1998, okazinta en Francio. Lia ludado okulfrappe montriĝis fuŝa, supozeble pro subita malbonfarto. Laŭ la tiama opinio de la brazilaj futbalzelotoj, nome preskaŭ la

tuta nacio, Ronaldo kulpas pri la malvenko antaŭ la teamo de la gastiganta Francio. Pli ĝuste dirite, eklipsis la brazilan skipon la zigzaga fulmo de Zinedine Zidane.

La dua polemiko okazis dek jarojn post la fiasko en Francio kaj ja for de la verda tapiŝo de la stadiono. Ĉi-foje fotoj de Ronaldo transiris de la heroecaj sportaj paĝoj al la plej fifamaj folioj de la gazetaro. Afero kun du transvestuloj skandale malkaŝis privatan guston de la atleto. Unu el ili akuzis lin pro tio, ke la famulo ne dece pagis la ĝuitan servon. Siaflanke Ronaldo montris sin viktimo de ĉantaĝo. Antaŭ la bedaŭrinda fakto lia tiama fianĉino montris al li ion similan al la ruĝa karto montrata de arbitracianto dum matĉo.

Milionulo

De la infano naskiĝinta en modesta kvartalo de Rio-de-Janeiro ĝis la riĉulo posedanta 250 milionojn da realoj (pli ol 100 milionojn da eŭroj), Ronaldo fariĝis ankaŭ fenomeno de riĉiĝo pere de sporta kariero.

Miloj da knaboj – kaj iom post iom ankaŭ knabinoj – revas pri gloro tia. Kiom da esperigaj idoj ricevis nomon omaĝe al la fenomenata idolo! Certe nur minimuma parto el tiuj revuletoj sufiĉe golos, ĝis rikolti laŭrojn el la gazono. Al la resto la destino provizos maksimume modestajn bezonojn.

Jozefo Lejĉ



Ronaldo anoncis sian emeritiĝon.

Superbazare modifitaj ...

La kipra respubliko sin pretigas fariĝi la unua lando de Eŭropa Unio, kaj verŝajne de la tuta mondo, kies vendejoj kaj superbazaroj estos devigitaj eksponi sur apartaj bretaroj genetike modifitajn nutraĵojn. La novaĵo, de longe atendata de ekologiistoj, alvenas malmultajn monatojn antaŭ balotoj okazontaj en majo. Ĉiuj partioj, tamen, montrante nekutiman unuanimecon, sin devigis validigi la leĝproponon antaŭ la fino de la nuna oficperiodo.

Verda Partio

La batalo kontraŭ genetike modifitaj organismoj (GMO-oj), kiu kuntrenas historian „engetigon” de tiaj produktaĵoj, daŭras en Kipro almenaŭ ekde majo 2004. Tiam la loka ekologiisma partio (Kipra Verda Partio) prezentis proponon tian, esperante igi Kipron gvida en Eŭropo koncerne la lukton kontraŭ GMO-oj. La usona ambasado ne ŝatis la proponon. Spite al la verduloj, kaj pli-malpli oficiale, la ambasado premas ekde 2005 la grek-kipran parlamenton malzorgi pri la temo. Ĝi timis, ke falos vendoj de usonaj produktaĵoj – pluraj genetike modifitaj – ĉe la loka merkato.

Ingrediencoj

Laŭ aktualaj leĝoj, en la plimulto de landoj – inkluzive Kipron – manĝaĵoj indiku la ĉeeston de GMO-oj inter la ingrediencoj. Tio tamen ne ĉiam okazas. Industrioj ne interesiĝas pri diafaneco, nelaste ĉar mankas en la nuna momento pruvoj aŭ eĉ nuraj indicoj pri supozita danĝero de tiaj nutraĵoj.

Sed, kiel rimarkigas la verda deputito Jorgos Perdikis, ĉiam pli ofte mankas al konsumantoj rimedoj por elekti, kion meti en la puŝĉareton. Tial nepras, laŭ li, se ne repreni ĉiujn ĉi nutraĵojn, almenaŭ ilin meti en apartajn fakojn.

Roberto Pigro

Poliomjelito: ĉu la dua tutmonde likvidota infektmalsano?

En majo 1980 Monda Organizaĵo pri Sano sciigis, ke variolo estas likvidita en la tuta mondo. Tiun daton la homaro devus ĉiujare soleni kiel ĉefan feston. Unuiĝintaj Nacioj, agnoske al la kontribuo de la angla kuracisto Edward Jenner en la kontraŭ-variola vakcinado, povus senerare glori lin kiel bonfaran-ton de la tuta homaro. Pli ol 3000 jarojn variolo estis ĉiama plago de la tuta ho-mar, mortigante ĉiun trian aŭ kvaran malsanulon, blindigante multajn aliajn kaj lasante por ĉiam sur la vizaĝo de ĉiu postvivanto cikatrojn de tiu malsano. Kaj jen nun, danke al scienco kaj insista agado de multaj miloj da medicinistoj, la plej danĝera malsano estis eliminata. Tiu sukceso inspiris la homaron provi atingi similajn rezultojn en eliminado de iuj aliaj malsanoj. Inter ili la plej grandaj

esperoj estis ligitaj kun la eblo de likvidado de poliomjelito.

Kio estas poliomjelito?

Poliomjelito estas tiel antikva malsano kiel variolo. Estis trovita egipta bareliefo (1580-1350 jaroj a.K.), sur kiu estas figurita pastro kun paralizita kaj atrofia dekstra piedo tipa por la sekvoj de poliomjelito. Kvankam poliomjelito ne estis tiom disvastiĝinta kaj pereiga malsano kiel variolo, tamen en diversaj historiaj periodoj okazis epidemiaj eksplodoj de la malsano, kies sekvoj estis multenombraj paralizoj, ekzemple, ili estas priskribitaj en la verkoj de la greka kuracisto Hipokrato. En la unua duono de la 20a jarcento grandskalaj epidemioj de poliomjelito okazis en multaj landoj

de Eŭropo, precipe en Britio, Danio, landoj de Skandinavio ktp, sed ankaŭ en Usono, Kanado, Sovet-Unio kaj aliaj. Estas konate, ke la usona prezidanto Franklin Roosevelt, pro la sekvoj de poliomjelito, devis sin movi en speciala kaleŝo. En 1909 estis evidentigita la virusa kaŭzo de la malsano kaj baldaŭ post tio estis trastuditaj la mekanismoj de infektiĝo kaj vojoj de la transmisio de poliomjelito. La primara lokalizado de la virusoj estas epitelio kaj limfa histo de la faringo, de kie ili povas eliĝi kaj disvastiĝi aerogute. Sed la ĉefa lokalizado de la virusoj de poliomjelito estas la homa intestaro, de kie ili eliĝas kun fekaĵo kaj transmisiĝas per infektitaj akvo, laktaĵo, legomoj, manoj ktp. Muŝoj ankaŭ povas transporti virusojn de poliomjelito kaj infekti nutraĵon.



En ĉiuj landoj oni enigis vakcinadon kontraŭ poliomjelito en la kalendaron de devigaj vakcinadoj.

La virusoj povas longe (dum 3-4 monatoj) resti vivkapablaj en la ekstera medio. Ĉe pli ol 90 % da infektitoj okazas nur sensimptoma virusportado en la intestaro. La paraliziga formo de poliomjelito aperas nur ĉe malpli ol unu procento de infektitoj, kiam la virusoj el la epitelio de la intestaro penetras la sangon, de kie ili atingas la antaŭajn kornojn de la spina medolo kaj la cerebron. Pro la detruo de neŭronoj (nervaj ĉeloj) ĉe malsanuloj aperas muskola atrofio kaj paralizoj, plej ofte de la kruoj. En gravaj kazoj, kiam estas frapita la cerebro, la malsanulo povas pere. La malsanuloj izoliĝas kaj kuraciĝas en infektaj malsanulejoj. Oni efektivas desinfekton. Personoj kun la sekvoj de poliomjelito bezonas ortopedian helpon.

Bezonoj por la likvido de poliomjelito

Dum 1954-1955 en Usono aperis la unua efika kaj sendanĝera kontraŭ-poliomjelita vakcino, kreita de doktoro Jonas Salk. Ĝi enhavas mortigitajn poliovirusojn de tri tipoj, kontraŭ kiuj la organismo ellaboradas defendajn antikorpojn. La vakcinon oni enigas en la organismon per injektoj. Sed vakcino havas gravan nesufiĉecon: ĝi stimulas fabrikadon de antikorpoj, kiuj neniigas virusojn, trovitajn nur en la sango, sed ne tiujn en la intestaro. Do, la vakcino sukcese protektas la organismon kontraŭ paralizigaj formoj de poliomjelito, sed ne preventas la virusportadon, t.e. ne sendanĝerigas la ĉefajn fontojn de infektado. Post du jaroj, la usona doktoro Albert Sabin malkovris kontraŭ-poliomjelitan vakcinon, entenantan vivajn, sed malfortigitajn (atenuigajn) poliovirusojn de tri tipoj. Kontraŭ ili en la organismo produktiĝas antikorpoj, kiuj neniigas virusojn, kiuj ne nur penetras la sangon, sed ankaŭ loĝas en la intestaro. Do, la vakcino de Sabin protektas la organismon ne nur kontraŭ paralizigaj formoj de la malsano, sed ankaŭ kontraŭ virusportado en la intestaro. La vakcino de Sabin havas ankoraŭ unu preferindecon: ĝin oni enigas en la organismon perbuŝe, en formo de gutoj. Sed ĝi ne

estas tute sendanĝera: ĉe unu el du milionoj da vakcinitoj (aŭ eble kelkaj kazoj el unu miliono) povas aperi simptomoj de vakcinorilata poliomjelita paralizo. Sed la kapableco de la vakcino preventi la disvastigon de poliomjelito multe superas tiun difekton.

En 1988 Asembleo de la Monda Organizaĵo pri Sano akceptis rezolucion pri likvido de poliomjelito ĝis la jaro 2000. Tia certeco baziĝis sur la alta efektiveco de la viva kontraŭ-poliomjelita vakcino de Sabin. Tamen post la jaro 2000 oni kelkfoje prokrastis la tempolimojn de elimino de poliomjelito. Sed kvankam la likvido de la malsano ankoraŭ ne estas atingita, en la lukto kun poliomjelito jam estas signifaj sukcesoj. Poliomjelito jam oficiale estas eliminata en Ameriko, Eŭropo, Rusio, Ĉinio kaj en multaj aliaj landoj de Azio kaj de Pacifiko.

Kompare kun 1988, la kvanto de infektitaj homoj en la mondo en 2008 malpligrandiĝis je 99 %, kaj la kvanto de endemiaj landoj dum tiu periodo malpliĝis de 125 ĝis 4 (Barato, Pakistano, Afganio kaj Niĝerio), en kiuj estas disvastiĝintaj poliovirusoj de la 1a kaj 3a tipoj, dum la 2a tipo jam estas tutmonde eliminata. La kaŭzoj de la persisteco de la poliovirusoj en tiuj regionoj estas nesufiĉa vakcinado, difektoj en higieno ktp. Sed krom endemiaj regionoj, poliomjelito de tempo al tempo registriĝas ankaŭ en iuj aliaj landoj. Antaŭ kelkaj jaroj estis epidemio de la malsano en Namibio, kie la plimulto de malsanuloj estis plenaĝuloj. Malsanuloj estis registritaj ankaŭ en Angolo, Burundo, Konga Demokratia Respubliko kaj aliaj afrikaj landoj. Printempe de 2010, epidemio de poliomjelito eksplodis en Taĝikio – la malsano verŝajne estis enportita el endemia Afganio. Kun migrantoj kelkaj kazoj de poliomjelito el Taĝikio estis enportitaj en Rusion, kaj unu malsanulo mortis. En ĉiuj landoj oni enigas vakcinadon en la kalendaron de devigaj vakcinadoj. Sed en la endemiaj regionoj kaj en tiuj, kie estas granda minaco de enportado de poliomjelito, krome oni okazigas tiel nomatajn naciajn tagojn de vakcinado.

Tiam oni vakcinas samtempe ĉiujn infanojn ĝis 3-5-jarajn, kio ĉesigas la cirkuladon de la virusoj inter homoj. Tio, ekzemple, antaŭnelonge okazis en Barato, kiam dum unu tago estis vakcinitaj perbuŝe 180 milionoj da infanoj malpli ol 5-jaraj. En tiu kampanjo partoprenis, krom enlandaj medicinistoj, multaj miloj da volontuloj el diversaj landoj.

En la landoj, kie oni uzas por vakcinado la vivan vakcinon de Sabin, registriĝas ege malofte vakcinorilataj kazoj de paralizoj, verŝajne ĉe personoj kun nesufiĉa imunstatus. Tial en iuj landoj, kie poliomjelito estas likvidita, por evitiĝi postvakcinajn komplikiĝojn, nun oni akceptas nur la vakcinon de Salk, entenantan mortigitajn poliovirusojn. Sed en la landoj, kie ankoraŭ registriĝas poliomjelito, necesas uzi por vakcinado la vakcinon de Sabin, ĉar la vakcino de Salk ne estas kapabla preventi la virusportadon.

Konkludo

La eliminado de poliomjelito en grandegaj teritorioj – Ameriko, Eŭropo, multaj landoj de Azio kaj de Pacifiko, kie ankoraŭ antaŭ 60-70 jaroj furiozis epidemioj de la malsano – esperigas, ke la fina celo, likvido de poliomjelito, realigeblos. Tamen nun ekzistas kvar endemiaj regionoj, kie poliomjelito persistas. Tio ankaŭ prezentas minacon de elportado de la malsano en aliajn landojn. Sed sen pli aktiva internacia helpo, la gvidantaro kaj medicinistoj de endemiaj regionoj ne povos ŝanĝi la situacion, des pli en tiuj landoj, kie estas multe da aliaj problemoj: malriĉeco, ĉiujaraj inundoj, enlandaj militaj konfliktoj (Afganio), malsato, aidoso, malario (multaj regionoj de Afriko), kaj eĉ miskompreno pri la efikoj kaj celoj de vakcinado mem. Nun ekzistas speciala fonduso de Monda Organizaĵo pri Sano por la kontraŭago al aidoso, tuberkulozo, malario. La kreado de simila fonduso ne malpli gravas por la elradikigo de poliomjelito. La finfaro de likvido de poliomjelito estas celo por la homaro tiel grava kaj nobla kiel tiu de variolo.

Vladimir LEMELEV

La ideala palaco de poŝtisto Cheval

Je ĉirkaŭ 60 km sude de Liono situas la urbeto Hauterives [otrív], en kiu troviĝas stranga konstruaĵo, konata kiel *La ideala palaco de poŝtisto Cheval*. Temas pri la sola modelo de naŭa arkitekturo. Pro tio ekde la jaro 1969 ĝi estas protektita monumento. Ferdinand Cheval [ferdiná ŝevál] (1836-1924) estis poŝtisto en Hauterives. Ĉiutage li devis marŝi pli ol tridek kilometrojn en la ĉirkaŭa kamparo por porti leterojn. Oni scias, ke marŝado helpas la pensvagon. Tiel, tagojn post tagoj, tiu humila kampardevena poŝtisto pripensis la destinton de homoj kaj mondo.

Ŝtonkolektado

Iun tagon en aprilo 1879 rapide marŝante Cheval stumblis sur ŝtono kaj falis. Observante la kialon de sia falo, li vidis ŝtonon belforman kaj prenis ĝin. La sekvan tagon li samloke vidis aliajn belajn ŝtonojn kaj decidis preni ilin.

Dum siaj marŝadoj li revis pri palaco, kiun li ŝatus konstrui kaj imagis, ke la tro-

vitajn ŝtonojn li povus uzi tiucele. Ekde tiam ĉiutage Cheval prenis ŝtonojn kaj portis ilin hejmen. Alifoje, kiam li trovis tro da ŝtonoj, li faris ŝtonamasetojn ĉe la vojrandoj kaj revenis post la labortago kaj per sia ĉareto transportis ilin. Tagon post tago li lernis tion, kio utilis por konstrui, selektis ŝtonojn, kuncementis ilin kaj komencis la konstruadon de sia palaco.

Emeritiĝo

Por daŭrigi la konstruadon, kiu jam ekhavis formon, Cheval aĉetis en 1889 la terenon de najbaro. Ĉi-lastata vendis ĝin trioble pli multekoste ol la normala prezo al „tiu frenezuleto, kiu plenigas sian ĝardenon per ŝtonoj”. En 1896 li emeritiĝis kaj povis uzi sian tutan tempon por la konstruado. La palaco rapide havis imponan aspekton kaj vizitantoj ĉiam pli alvenis. Li eldonigis poŝtkartojn, kiujn li vendis por helpi la kompletigon de sia palaco, kiu fine okazis en 1912. Do, tridek tri jarojn post la meto de la unua ŝtono. La palaco estis vere mirinda,

nekredebla. Per la trovitaj ŝtonoj, per mortero, cemento li konstruis murojn 26 metrojn longajn kaj ĝis 11 metrojn altajn, ornamitajn per scenoj mitaj aŭ ekzotaj.

Cheval estis nesufiĉe edukita, li ne vojaĝis. En Parizo li laboris kiel panfaristo kelkajn jarojn



Poŝtisto
Ferdinand
Cheval.

en sia junaĝo. Ĉiujn siajn ideojn pri la ekstera mondo li verŝajne trovis sur la poŝtkartoj, kiujn li portis al la adresatoj. Tial oni povas vidi sur la palacaj muroj bildojn de hindua templo, araba moskeo, svisa ligna dometo kaj aliaj. La palaco iel prezentas scenejon de la mondo kun ties mitoj, historio kaj estaĵoj, kiel imagis ilin la poŝtisto Cheval. La tuta palaco vidata el iu perspektivo memorigas al kamboĝa templo de Angkoro. Oni povus rememori ankaŭ pri la samepoka kataluna arkitekto Gaudi.

Jen saĝe, jen naive

Diversloke en la palaco troviĝas enskribitaj frazoj kaj diraĵoj fojfoje saĝaj, fojfoje naŭvaj laŭ lia kredo. La unua skribaĵo, kiun oni vidas alveninte, estas „Ĉio, kion vi, pasanto, vidas, estas verko de kamparano.” Alia frazo notinda: „Por bona homo, ĉiuj popoloj estas fratoj.” Cetere, kvankam Cheval estis kristano, la kunekzisto de alireligiaj simboloj en lia palaco montras, ke li povus esti allogita de homaranismo, se li konus ĝin.

Antaŭ ol morti, Cheval konstruis ankaŭ sian tombon samstile en la urbeto tombejo („La tombego de silento kaj senfina ripozo”). Post du jaroj li forpasis 88-jara. Pri Ferdinand Cheval, humila kampara poŝtisto, kiun najbaroj opiniis freneza, la fama surrealisto André Breton [andré bretó] verkis poemon, kaj la kantisto Michel Fugain [miŝél fjugé] kanzonon. Ĉiujare pli ol 120 000 personoj vizitas lian *idealan palacon*.

Thierry TAILHADES



La norda muro de la ideala palaco.

Ĉu gravas, se lingvoj mortas?

Kreskanta nombro da lingvistoj kaj aliaj fakuloj maltrankviliĝas pro la fakto, ke en ĉiu dusemajna periodo malaperas po unu lingvo¹. Oni taksas, ke ĝis la jaro 2100 verŝajne malaperos pli ol duono de la pli ol 7000 lingvoj parolataj sur la tero.

Ĉu gravas tiu amasa formorto de homaj lingvoj?

Neriparebla perdo

Nuntempe internaciaj organizaĵoj kiel Unesko kaj pluraj individuaj influhavaj voĉoj atentigas pri la neriparebla perdo, kiun la homaro suferas, kiam eĉ unu lingvo estas forgesita. Interesa konstato estas, ke multaj tiaj voĉoj devenas ĝuste de la amerika kontinento, kie tiom da aŭtoktonaj kulturoj, lingvoj kaj popoloj estis intence aŭ senintence eliminitaj

post la alveno de eŭropanoj.

Unu el la avertaj voĉoj estas tiu de la usona lingvisto K. David Harrison [deĵvid hĕrisen], kiu antaŭ kelkaj jaroj verkis la libron *Kiam mortas lingvoj – La estingiĝo de la lingvoj de la mondo kaj la erozio de homaj scioj*². En tiu libro Harrison konvinke montras per pluraj trafikaj ekzemploj, ke la malapero de iu ajn lingvo malriĉigas – kulture kaj eĉ science – la homaron.

Eble malmultaj el ni, memnomataj „civilizitaj” homoj, pretus rekonii, ke popoloj, kiujn ni rigardas kiel „primitivulojn”, povas posedi ege valorajn spertojn, scion kaj kulturon, de kiuj ni povas multe lerni. Tiujn valorojn ni neretroveble perdas ĉiam, kiam la lingvo de tia popolo estas forgesita. Tia perdo estas des pli tragika, kiam temas pri lingvo,

kiu ekzistis nur en parola formo pro la fakto, ke la koncerna popolo estis analfabeta.

Ni rigardu kelkajn el la ekzemploj cititaj de Harrison.

Perditaj scio kaj tradicioj

Komuna kliŝo asertas, ke eble oni trovos kuracilon kontraŭ kancero inter la plantoj, kiuj abunde kreskas en la amazona praarbaro. Certe oni konstatas, ke homoj vivantaj en primitivaj kondiĉoj ofte konas kaj povas nomi en siaj lingvoj grandan kvanton da kreskaĵoj, kiujn ili uzas por diversaj celoj.

Sed la scio de tiel nomataj „post-restintaj” popoloj tute ne limigas sin al plantoj kaj bestoj. Multaj havas valorajn sperton kaj teknikojn ebligantajn al ili travivi en la plej diversaj kaj malfacilaj



JAKOV MORAN



JAKOV MORAN

Certe oni konstatas, ke homoj vivantaj en primitivaj kondiĉoj ofte konas kaj povas nomi en siaj lingvoj grandan kvanton da kreskaĵoj, kiujn ili uzas por diversaj celoj.



Multaj elektronikaj libroj estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.

kondiĉoj. Tia tradicia sperto havas multon por instrui al ni.

Ni faras grandegan eraron, se ni mal-estimas kaj ignoras tiun instruon. La unuaj eŭropaj esplorantoj de la arktaj regionoj mortis, ĉar ili ne havis sufiĉe da humileco por lerni la teknikojn de la inuit-popolo. Do, se la homaro perdus la tradician scion kaj lingvojn de aŭtoktonaj popoloj, ĝi riskas perdi okazojn por antaŭenigi la sciencon kaj riĉigi la kulturon.

Kiam lingvo aŭ popolo malaperas – specife se tia lingvo ne estas registrita en skriba formo – perdiĝas parto de la monda trezoro de rakontoj, poemoj, kantoj, tradicioj kaj historio. Eĉ multe da skribita kaj elektronike registrita materialo pri tiu heredaĵo verŝajne kuŝas en la keloj de muzeoj kaj bibliotekoj, forgesita kaj ignorata pro la fakto, ke neniuj plu komprenas la koncernan lingvon.

Forgesitaj specioj

Krome Harrison atentigas, kiom da scio estas perdita inter aŭtoktonaj popoloj en Siberio, indianoj en Arizono kaj aliaj, kiam ili ne plu uzas siajn tradiciajn specinomojn, kiuj klarigas, kiuj plantoj estas venenaj aŭ manĝeblaj kaj kiuj bestoj estas utilaj. Tiaj popoloj havas siajn proprajn taksonomiajn sistemojn, kiuj ne nur estas praktikaj, sed ankaŭ povas esti science valoraj.

Klasifikaj sistemoj kiel tiu de Lineo estas ja utilaj, sed homojn, kiuj ne ricevis klasikan okcidentan klerigadon, ili ne provizas per tuja informo pri specioj. Kontraste, tiu informo estas ja donata danke al la tradiciaj nomoj; kaj la sistemoj de klasifikado kaj karakterizado uzataj de indiĝenaj socioj prezentas alternativojn, kiuj helpas nin kompreni, kiel la homa cerbo funkcias kaj rekonas distingojn kaj similecojn.

Kiam la idoj ne plu konas la lingvon de la gepatroj aŭ prapatroj, ili ne plu rekonas, ke la nomoj de plantoj ofte indikas iliajn karakterizaĵojn, la celojn, por kiuj ili estas utilaj, aŭ la kialon, pro kiu ili estu evitataj.

Ni prenu ekzemplon el la endanĝerigita gaela lingvo de Skotlan-

do. La planto akileo (*achilea millefolium*) nomiĝas en la gaela „*lus-cosgadh-na-fola*”, kio signifas „kreskaĵo, kiu ĉesigas sangadon”. Tiu planto iam estis uzata post bataloj, por pansi vundojn. Plie, iu specio de la kreskaĵo eŭforbio gaele nomiĝas „*lus-leusaidh*” (veziketa planto), ĉar ĝi povas estigi veziketojn sur la haŭto, do devas esti evitata. Simile, tradiciaj nomoj de bestoj, birdoj kaj fiŝoj povas doni valoran informon al sciencistoj kaj nefakuloj.

Trezoro protektinda

Iam, kiam mi estis junulo, mi konversaciis pri lingvoj kun itala ŝipestro, kiu multe vojaĝis kaj konis plurajn idiomojn. Iom naive, mi demandis lin, kiu, laŭ li, estas la plej bela lingvo en la mondo. Li respondis *Tutte le lingue sono belle* (Ĉiuj lingvoj estas belaj). Tiu respondo forte imponis min, ĉar ĝi ŝajnis al mi tre profunda rimarkigo.

Fakte, ĉiu lingvo estas ne nur bela (ĉar ĝi esprimas la plej karajn kaj fortajn sentojn de la animo), sed ankaŭ esprimriĉa (ĉar ĝi kontentigas ĉiujn bezonojn de la socio, kiu ĝin parolas), saĝa (pro la sama kialo) kaj science valorla (pro la kaŭzoj jam menciitaj). Oni konkludas, ke la homaro nepre devas konstante klopodi por varti kaj protekti la lingvan riĉecon de la mondo.

En sia novelo *Buchmendel* la aŭstra verkisto Stefan Zweig [ŝtefan cvajk] skribis: „Tagon post tago ĉio, kio estas unika, iĝas pli kaj pli multvalora en nia nesaveble unuformiĝanta mondo.”

Garvan Makaj
(Garbhan MacAoidh)

1. Laŭ takso de National Geographic Society (Tutlanda Geografia Societo), scienca organizaĵo senprofita el Usono.

2. K. David Harrison: *When Languages Die – The Extinction of the World's Languages and the Erosion of Human Knowledge*. Eld. Oxford University Press, Oksfordo, 2007.

**Kontribuojn por la rubriko
Lingvo de Monato sendu al
lingvo@monato.net.**

anoncetoj

Survoje al la UK Kopenhago, de 18-23 julio 2011 la **Hamburga Somero (HoSo)** atendos vin en Germanio. Temo: "Hamburgo - mediprotekta ĉefurbo de Eŭropo 2011". Interrete www.esperanto-hamburg.de/hoso

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO sen-paga elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prele-ga programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera pro-pono, kun silvestra bufedo kaj silves-tra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj ĝejnuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knaĵpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.interna-cia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prove-kzemplerio. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Natur-ista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli gran-daj anoncoj petu la tarifon de la el-donejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

Elektronikaj libroj

ĉe Flandra Esperanto-Ligo!



avantaĝoj de e-libroj

- neniuj sendokostoj
- neniam spacomanko en la bretaroj
- oni ne bezonas haki arbojn por produkti la librojn
- la leganto povas grandigi aŭ malgrandigi la literojn de la libroj laŭbezone
- multe pli facile legebla en tramo, trajno, lito ...

La plej ŝatataj e-libroj ĉi-momente estas:

Flugi kun kakatuoj (Trevor Steele, historia romano)	8 €
Ĉu rakonti novele? (noveloj de Johán Valano = Claude Piron)	5 €
Humuro laŭ skota maniero (Andrzej Pettyn, humuro)	5 €
Kromosomoj (Lorjak, humura romano)	5 €
Murdo en Esperantujo (Daniel Moirand, krimromano)	5 €
Neokazinta amo (Lena Karpunina, novelaro)	9 €
La bela petveturantino (Leopold Vermeiren, erotiko)	5 €